

Christian Winther,
Flugu, ho bird'

*tradukita de Kristian Lang-
gaard*

Flugu, ho bird' trans la ondojn
de l' lago!
Nigra la nokt' venos nun.
Jen post l' arbar' malleviĝas la
tago
Kaj ŝtelforiras la sun'.
Nun vi rapidu al via in' pluma,
Kaj flavbekuloj apud ŝi;
Sed kiam tago krepuskos, la
luma,
Diru pri ili al mi!

Flugu, ho bird' trans la ondojn
brilantajn!
Via flugil' portu vin!
Se vi renkontos du homojn
amantajn,
Ho – vi esploru ŝin kaj lin!
Kiel poeto ja koni mi devus
Ĉion pri l' feliĉo de l' am',
Ĉiun doloron – la voĉon mi le-
vus
En ovacia deklam'.

Flugu, ho bird' trans la siblon
de l' lago!
Amo vin logas al ŝi.
Sidu nun inter susuro de l' fa-
go,
Kantu pri ŝi kaj pri vi!
Se mi nur povus eteren min le-
vi,
Scius mi, kien iros mi.
Sola povas suspiri kaj revi -
Mia amfrukt' estas ĝi

...

Christian Winther,
Flugu, ho bird'

*tradukita de Kristian Lang-
gaard*

Flugu, ho bird' trans la ondojn
de l' lago!
Nigra la nokt' venos nun.
Jen post l' arbar' malleviĝas la
tago
kaj ŝtelforiras la sun'.
Nun vi rapidu al via ino plu-
ma,
kaj flavbekuloj apud ŝi;
sed kiam tago krepuskos, la lu-
ma,
diru pri ili al mi!

Flugu, ho bird' trans la ondojn
brilantajn!
Via flugil' portu vin!
Se vi renkontos du homojn
amantajn,
ho – vi esploru ŝin kaj lin!
Kiel poeto ja koni mi devus
ĉion pri l' feliĉ' de l' am',
ĉiun doloron – la voĉon mi le-
vus
en ovacia deklam'.

Flugu, ho bird' trans la siblon
de l' lago!
Amo vin logas al ŝi.
Sidu nun inter susuro de l' fa-
go,
kantu pri ŝi kaj pri vi!
Se ankaŭ mi en l' aer' mi povus
levi,
scius mi, kien iros mi.
Mi en arbar' povas nur plendi,
revi -
- nura amfrukto por mi.

...

Christian Winther,
Flyv fugl, flyv

Flyv fugl, flyv over Furesøens
vove!
Nu kommer natten så sort,
Alt liger sol bag de dæmrende
skove,
Dagen den lister sig bort;
Skynd dig nu hjem til din fjedre-
de mage,
Til di guulnæbede små;
Men når i morgen du kommer
tilbage
Siig mij så alt hvad du så!

Flyv, fugl! flyv over Furesøens
bølge,
Stræk dine vinger nu vel!
Ser du to elskende, dem skal du
følge,
Dybt skal du speide deres sjæl.
Er jeg en sanger, så bør jeg jo
vide
Kjærligheds smigrende lyst,
Alt, hvad et hjerte kan rumme
og lide,
Burde jo tolke min røst.

Flyv, fugl! flyv over Furesøens
rislen,
Kjærlighed kalder dig hjem;
Sæt dig nu kjønt mellem
løvbuskens hvislen,
Syng så din kjærlighed frem!
Kunde, som du, jeg i ætheren
svømme,
Veed jeg nok, hvor gik min flugt;
Jeg kan i lunden kun sukke og
drømme,
Det er min kjærligheds frugt.

...

Flugu, ho bird' trans la bluan
akvaron!
Flugu al ŝi, flugu for!
Ie vi trovos solecan arbaron,
Kien sopiras la kor'.
Ora flirtetas harar' en venteto,
Gracila ja estas ŝi,
Nigraj okuloj kaj roza vange-
to,
Ho – ja ekkonos ŝin vi.

Flugu, ho bird', trans la lagan
bruadon !
Aŭdu! La nokta ĝemad'!
Flustras la arboj timeman sib-
ladon -
Estas vespersalutad'.
Birdoj eĉ sentas de l' amo do-
loron
Same kiel homoj ni.
Kiu konsolu nun mian koron?
Nun „Bonan nokton!“ al vi.

*Traduko de la Dana poemo
“Flyv fugl, flyv” de CHRISTIAN
WINTHER (Kristiano Vintero,
*1796 – †1876) en Esperan-
ton de KRISTIAN LANGGAARD
(*1894 – †1957).*

Arg-355-703 (2009-05-16
12:17:06)

*Tiun poem-esperantigon mi,
Manfred Retzlaff, trovis en la
libro “Esperanto-poemoj”, eldoni-
ta en 1937 de la dana eldonejo
“SEFO”, Nykøbing. (En la kelkaj
strofoj de la esperantigo verkita
de la tradukinto K. Langaard mi
faris kelkajn modifojn, por pli
konformigi la versritmon al la
dana-lingvo originalo. La kvar
lastajn liniojn mi provis aliigi
komplete.)*

Flugu, ho bird' trans la bluan
akvaron!
Flugu al ŝi - flugu for!
Ie vi trovos solecan arbaron,
kien sopiras la kor'.
Ora harar' flirtetas en venteto,
rekta, gracila estas ŝi,
nigraj okuloj kaj roza vangeto,
ho – tuj ŝin konas ja vi.

Flugu, ho bird', trans la lagan
bruadon !
Aŭdu! La nokta ĝemad'!
Flustras la arboj timeman sib-
ladon -
estas vespersalutad'.
Ĉu vi aŭskultis? Eĉ inter bir-
daro
- granda, profunda amdolor'!
Diru nun en la malluma arba-
ro
bonnokton al mia kor'!

*Traduko de la Dana poemo
“Flyv fugl, flyv” de CHRISTIAN
WINTHER (Kristiano Vintero,
*1796 – †1876) en Esperan-
ton de KRISTIAN LANGGAARD
(*1894 – †1957).*

Arg-355-704 (2009-05-16
15:18:45)

*Origina tradukversio de Kristi-
an Langaard, troviĝanta en la
libreto “Esperanto-poemoj”, eldo-
nita en 1937 de la eldonejo “SE-
FO”, Nykøbing, Danlando.*

Flyv, fugl! flyv over Furesøens
vande,
Langt, langt bort i det blåe!
Eensomt i skoven ved fjerneste
strande
Seer du min favre at gåe.
Guulbrune lokke de flagre i vin-
den,
Let er hun, rank som et ax,
Øiet er sort, og roser har kinden,
Ak! du kan kjende hende strax!

Flyv, fugl! flyv over Furesøens
brusen,
Dybt drager natten sit suk!
Træerne hviske med ængstelig
susen,
Hilse Godnat med et buk!
Har du ei lyttet til mangefold
smerte
Selv hos den fjedrede flok?
Siig et Godnat til mit bævende
hjerte,
Siig det, du veed det jo nok.

*Verkinto de tiu ĉi Dana poemo
estas CHRISTIAN WINTHER (Kri-
stiano Vintero, *1796 – †1876).*

Arg-355-702 (2009-05-16 15:21:37)

*Tiu origina dana-lingva teksto
estas troveble interalie en la rete-
jo [http://www.recmusic.org/
lieder/w/winther/](http://www.recmusic.org/lieder/w/winther/).*